

Manfred Hausmann,

## La perloj

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Vi, kvankam scias vi, ke ja ligita  
kun man' kaj kor' al edzo estas mi,<sup>2</sup>  
de vi al mi sekrete alsendita  
jen estas tiu perl-par' ĉi.

Freneza devas esti vi - mi devas  
konfesi, ke feliĉon sentas mi  
la perlojn rigardante - Ĉu mi revas? -  
Ĉu vera estas tio ĉi?

Kaj nia dom' en sia olda brilo  
sin levas ĉe la reĝa ĝardenar'.  
Jen mia edz' kun sia batalilo,  
la estro de l' reĝ-gardistar'.

Kaj kion ankaŭ pensis menso via,  
dum vi al mi ofertis tion ĉi,  
Mi ja promesis, ke ĝis morto mia  
fidela volas resti mi.

Reprenu la donacon senespere!  
Se iam estus renkontintaj ni,  
- sed tion povis ne okazi vere -  
ja estus eble via mi.

...

---

<sup>2</sup>aŭ: al edzo, ho sinjoro, estas mi,

*Traduko de la Germana poemo "Die Perlen" de MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-888-1770 (2013-06-04 23:53:48)*

*Pri la poeto vidu ankaŭ la retejon <http://history.cultural-china.com/en/59History8512.html>.*